# Pola Esperantisto

Nro 2—3
Junio / Julio 1946 Czerwiec / Lipiec
Jaro XXXIV Rok

# Esperantysta Polski

monata organo de Asocio de Esperantistoj en Pollando


## LA UNUA POSTMILITA POLLANDA ESPERANTA KONGRESO EN ŁÓDŹ (PENTEKOSTE 1946)

Por mi, esperantisto de preskau 30 jaroj, senchese partoprenanta en la movado, chiu landa kongreso au konferenco (ne parolante jam pri la Univ. Kongreso, kiujn mi cheestis nur en Gdańsk, Krakovo kaj Varsovio) estas granda okazintajho, pri kiu mi pensas antau longa tempo kaj kiu impresas min dum plua posta laborado.

Kaj nuna kongreso au pli ghuste konferenco estis duoble por mi grava. Unue, por mi, preskau mirakle savinta el la ungegoj de germanaj murdistoj, ghi montris al mi, ke la plej terura kataklismo ne povis pereigi nian movadon kaj due, mi bone sciis, ke ne partoprenos ghin kaj jam neniun kongreson, tiuj multnombraj amikoj, kunlaborantoj, kun kiuj tiom ofte mi diskutis, babiladis, shercis kaj iafoje kun kelkaj ech flirtis (kompreneble temas pri samideaninoj!). Jes, la senkompara germana furiozo forigis ilin chiujn kun milionoj da senkulpaj homaj vivoj...

Sed

„vivon ghuu la vivanto,
dormu pace la kadavr!
kiel diris la poeto.

Kaj ree ni plue semu, „mil semoj perdighos, ni semas kaj semas konstante".

Pri la okazonta kongreso aperis kelkafoje notajhoj kaj mencioj en preskau chiuj lokaj (varsoviaj) gazetoj. Ankau radio plurfoje raportis pri ghi. Tamen pro la ekonomiaj kau-

zoj kaj amasa perdo inter la esperantistoj mi estis iom skeptika rilate al ghia partopreno, des pli mi estas kontenta, kiam al ghi alighis 102 gesamideanoj el 17 lokoj de Pollando.

Malgrau, ke la kongreso devis okazi dimanche la 9-an de junio matene, ni, grupo da varsoviaj gesamideanoj, decidis veturi al Łódź jam sabate matene, char ni deziris profiti de la aranghoj kaj plezuroj de la ne ruinigita urbo.

Longan tempon antau la foriro de la vagonaro mi kun s-no Majewski ,,okupas" la kupeon. La flirtanta el la fenestro verda flageto, — multaj preterirantoj supozas, ke veturas iu delegitaro de la popolvilagha partio, kies koloro estas verda, — kiel la nokta lumo altiras papiliojn, altiras gesamideanojn kaj jam baldau nian kaj najbaran kupeojn plenigas la kunpremita areto gesamideana. Kune kun ni veturas bofilino de nia Majstro s-anino Wanda Zamenhof kun sia filo Ludoviko; s-no Sakowicz, kiu jhus profitas la okazon por kapti (ne animon, sed) monon de iu facilanima esperantisto por sendi ghin al IEL-paradizo; s-no Zawada, kiu kiel kutime ne sukcesis fini la regularon; d-ro Czubryński kun sia prelego en dorssako (nur oni ghin ne shtelu! — la prelegon!) kaj kelkaj aliaj novaj, sed fidelaj gesamideanoj. Baldau ekster nia vagono oni alligas grandan tolelpendajhon: ,,X Pollanda Kongreso de Esperanto en Łódź, 9. 10. 6. 1946".

En Lodza stacidomo renkontas nin la afabla studento s-no Pawłowski, kiu akompanas nin al la privata loghejo de s-no Monkiewicz, kongresoficejo.

La sekvantan matenon mi direktas min al la kongresejo — Lodza Universitato. Survoje ialoke sur anonctabuloj kaj anonckolonoj mi rimarkas la frapan afishon pollingvan kun la verda stelo pri la kongreso. Mi nur bedauras, ke la afishoj venis Varsovion unu tagon antau nia forveturo kaj ne povis esti uzitaj.

Jam demalproksime mi rimarkas niajn standardojn, pendantaj super la eniro. Konformaj surskriboj helpas la orientighon. La tutan shtuparon (kongresejo estas sur la 3-a etagho) borderas junaj abioj kaj betuloj, memorigante pri nia arbaro esperanta, kiun ne povis elradikigi la kruela kataklismo kaj pri la Pentekosto, festo de printempo kaj renovigo.

La salono aspektas tre bele, ree abioj kaj betuloj. Fronte sur la verda podio portreto de la prezidanto de la Landa Popola Konsilantaro s-ro Bierut, chefministro s-ro Osóbka-Morawski kaj Zamenhof. Sur la muroj amike krucighas standardoj de la ,,burgha" kaj ,,laborista" esperantaj movadoj, kiel simbolo de la unuecigo, ja ni havas en nia lando **unu solan Asocion kun** diversaj sekcioj. Kaj mi volas kredi, ke

venos fine la tempo, kiam ekzistos nur **unu** Universala Esperanta Ligo, starigita je la plej demokrataj principoj al kiu apartenos chiuj organizajhoj esperantistaj kiel S. A. T., I. K. U. E. kaj aliaj. Chu estas nur revo? De ni dependas, ke ghi farighu realajho! En fino de la salono pendas la skribajho: „Esperanto en la servo de la tutmonda homaro".

Sed ree estas peza la koro, ree larmas la animo. Mankas ili, la plej viglaj, la plej shatataj...

S-ano Monkiewicz malfermas la kongreson. La prezidantaran tablon okupas gesa-noj Zamenhof, Alfus, pastro Furmanik, Kuczer, Monkiewicz, Piotrowski, Sakowicz, Woźnicki, Zawada, kiu prezidas. Oni ekkantas la polan kaj esperantan himnojn. (Chiu lasta sonas sufiche kontentige, sufiche malofta okazintajho che la esperantaj aranghoj.). Per momenta silento oni honorigas la memoron de la murditaj kaj mortintaj gesamideanoj. Shajnas, ke iliaj spiritoj shvebas en la salono super niaj kapoj, promesante helpon kaj apogon.

La unua ekparolas en la nomo de chefministro s-ro Osóbka-Morawski kaj Lodza urbestraro vicprezidanto s-ro Duniak, en la nomo de la cheestanta en la salono rektoro prof. Kotarbiński kaj universitata estraro parolas nia malnova samideano prof. dro Muszyński, adv. Mamrot por Societo de Amikoj de UNO. Sekvas paroladoj de reprezentantoj de sociaj kaj esperantaj societoj. Tre emocie parolas la nestoro de nia movado, la preskau 80-jara pastro Furmanik.

Oficialan parton finas la konciza kaj interesplena prelego de s-no prof. Muszyński je la temo: „Historio de artaj lingvoj kaj Esperanto", entuziasme akceptita de la multenombra cheestantaro. (Estus bone, se ghi povus aperi broshurforme por la vasta publiko).

Sekvas komuna fotografado.

Post la komuna tagmangho komencighas la laborparto, pri kiu detale skribos kongresa sekretario s-no Kuczer. Mi nur volas noti, ke la unua numero de la denove aperanta „Pola Esperantisto" elvokis grandan kritikon. Al la kritikemuloj mi nur diras: ne kritiku, sed kunlaboru kaj ne traktu la legantojn kiel infanojn, bezonatajn porinfanajn legajhojn. Ni estu seriozaj!

Vespere la kongresanoj partoprenas tre belan prezentadon de Moliera „Friponajhoj de Skapen" en la urba teatro.

La lundan matenon kunvenas la kongresanoj sub la memortabulo che la strato Zamenhofa. S-no Andrzejczak raportas pri la sorto de la tabulo, kiu enmurigita en la jaro 1930 okaze de la IV Tutpollanda Esperanta Kongreso, estis depre-

nita de la germanaj barbaroj, uzita kiel pavimshtono en iu ghardeno, hazarde retrovita kaj ree enmurigita. S-no Dratwer esperas, ke ,,baldau venos la tempo, kiam sur placoj de chiuj chefurboj staros monumentoj al Zamenhof kaj stratoj en multaj urboj de la mondo portos Lian nomon". Kiel predikisto de ambono impresplene kaj kortushe parolas nia plej maljuna s-no pastro Furmanik;; kiel kutime volas rosti sian klasbatalan hepaton, neshanghebla s-no Czechowski, chiama pledanto por la laboristaj rajtoj kaj ideoj; s-no Toczyski deklamas la versajhon de Matwiejczuk pri Zamenhof. Oni ree kantas la himmojn kaj la solenajho sub la Zamenhofa memortabulo estas finita.

La partoprenantoj formas demonstracion, kiu male, ke ne chiuj kongresanoj kuniris (multaj gesamideanoj opinias, ke la Kongreso konsistas nur el la Solena Malfermo) estas sufiche impona kaj elvokas intereson che la publiko.

La prelego de s-no d-ro Czubryński pri ,,Intershtata Esperanta Akordo" elvokis sufiche viglan diskutadon. Ni sciu, ke ministerioj de edukado nur tiam agnoskos Esperanton, se tion postulos la popolo. Tial ni klopodu varbi por nia afero diversajn kulturajn, sociajn, politikajn organizajhojn, altiri la plej vastajn homamasojn. Tiam certe ni venkos!

Ankau diskuton elvokis la problemo pri rilato al germanaj esperantistoj. Chiuj paroladistoj substrekis, ke pro la faritaj krimoj kaj kruelajhoj kulpas la tuta germana popolo kaj oni devas eviti la rilatojn kun la germanaj esperantistoj.

Oni priparolis ankau aliajn problemojn kaj proponojn, kies realigo certe antauenpushos nian movadon en Polujo.

Jam vespere oni finas la unuan postmilitan Kongreson de Pollandaj Esperantistoj.

Kelkaj grumblis pro la chesigo de la rabato en la hotelo kaj ne ricevo de la fervoja rabato. Sed mi bone scias, ke en ambau kazoj ne kulpas la Organiza Komitato, al kiu pro la organizo de la bone sukcesinta Kongreso oni shuldas nian plej sinceran dankon.

Mi esperas, ke la Kongreso estos nova vojshtono por nia movado en la libera, demokrata Pollando. **I. Dratwer**

## RAPORTO PRI LA GHENERALA KUNVENO DE DELEGITOJ de A. E. P.

La 9-an de junio — posttagmeze — komencighis kaj la 10-an finighis la Ghenerala Kunveno de Delegitoj de A. E. P. En ghi estis reprezentitaj jenaj urboj: Warszawa (Zawada J., Czechowski B., Dratwer I.), Kraków (Alfus J., Kuczer L., Piotrowski

A.), kaj Łódź (Monkiewicz B., Fethke St., Dr Sołoniewicz R.). Prezidis s-ano Alfus, sekretariis s-anoj Kuczer kaj Woźnicki.

En sia malferma parolado mencias s-ano Alfus pri la diferenco inter la iama PED kaj nuna AEP, konstatante, ke tiuj-chi du instancoj na estas la samajn. Li skizas la historion de Asocio de Esperantistoj en Pollando, ghia celo fondi reton da grupoj por organiza laboro, ghiaj klopodoj pri la restarigo de la gazeto, enkonduko de la E. en la lernejojn kaj fine li alvokas al kunigho de chiuj aktivaj s-anoj.

La raporton pri la ghisnuna laboro de la Chefa Estraro (Ch. E.) prezentas s-ano Kuczer, ghenerala sekretario de A. E. P. Li konstatas, ke ghi sukcesis organizi grupojn en 6 lokojn (en kelkaj aliaj en fondigho) ne nur „dank' al kunlaboro de malnovaj s-anoj sed ankau dank' al novaj fervoraj s-anoj. La Ch. E. sukcesis jam interrilati kun multaj eksterlandaj grupoj kaj esp. gazetoj.

La kasraporton de la Ch. E. prezentas s-ano Piotrowski. En la diskuto pri la raportoj partoprenis multaj s-anoj i. a. s-ano Czechowski konstatas, ke la laboro de la Ch. E. estas sufiche granda kaj se oni taksas la fakton, ke la laboron faras homoj, chiuj profesie okupitaj — ghi estas des pli kontentiga. Liapense la plej grava afero estas: enkonduki E. en la lernejojn. S-ano Zawada konstatas, ke la E.-laboro de la varsoviaj s-anoj komencighis jam en Lublin, kiam aro de 6 anoj fondis E-sekcion che TUR.

Post la diskuto, la Delegitoj, auskultinte raporton de la Revizia Komisiono — akceptis ghin kaj unuanime konsentis absolvon al la Ch. E.

Kaj nun prezentas s-ano Alfus la budgheton por la j. 1946/7. Dum la diskutado, oni proponis libervolajn donacojn por subteni la financojn (Kęsicki), oni raportis, ke ghis nun subvencion ricevis nur Krakowa Grupo kaj oni devas turni sin pri subvencioj al kooperativoj ne al Ministerioj (Piotrowski), oni proponis plifortigi la propagandon (Czechowski), oni parolis pri ghenerala akcepto de la budgheto (Dratwer) kaj fine oni rimarkigis, ke chefa fonto de la ensprezoj por la grupoj devas esti kursoj (Alfus). Multaj konstatis neceson de pagota sekretario. Per vochdonado oni akceptis unuanime la prezentitan budgheton.

Nun sekvis elektoj de la Chefa Estraro. Ghi prezentas sin jene: s-ano Alfus — kiel prezidanto, estraranoj: Kuczer, Piotrowski, Rauczyński, Silhan, Sowówna, prof. Sygnarski — el Kraków, s-anoj Czechowski, Dratwer, Zawada — el Warszawa, s-anoj Andrzejczak, Monkiewicz — el Łódź kaj s-ano Lipok — el Chropaczów (Silesio). En la Rev. Kom. oni elektis s-anojn Grabowski, Dr Owczyński (Kraków), Jaraczewski, Kaus kaj Wrzesiński

(Warszawa).

Poste komencighis vigla diskutado pri multaj prezentitaj proponoj.

Oni decidis fiksi la enskribpagon al AEP por chiu ano je 20 zł. kaj monatkotizon je 18 zł., entenantan samtempe la devigan abonon, de „Pola Esperantisto" (PE) por chiu grupano (en la diskutado partoprenis s-anoj Dratwer, Piotrowski, Alfus, Zawada, Kuczer, Monkiewicz).

Oni decidis, ke la Redakcia Komitato de „PE" elektos respondecan redaktoron (en la diskutado partoprenis s-anoj Alfus, Czechowski, Zawada, Dratwer, Kęsiński, Monkiewicz). En la Red. Komitaton eniris s-anoj Alfus, Czechowski, Dr Czubryński, Dratwer, Monkiewicz, prof. Sygnarski, Zawada.

S-ano Alfus raportas pri la klopodoj de la Ch. E. por enkonduki E. en la lernejojn de krakova kuratorio. Oni decidas plu labori en tiu-chi direkto che la Ministerio de la Klerigado.

Oni proponis (Zawada) turni sin al Ministerio de la Klerigado por konfirmo de la Ekzamena Komisiono, kiu estus rajtigota doni atestojn por lernado de E. en lernejoj.

Oni rimarkigis pri necesego eldoni tuj lernolibrojn (Piotrowski), vortarojn (Zawada). La solvon de tiu-chi problemo oni lasis al la Ch. E.

Oni transdonis al Ch. E. la organizon de korespondaj kursoj en Pollando.

Oni decidis turni sin al la Direkcio de „Polskie Radio" pri permeso de disaudigo en E. minimume po 1 horo semajne kaj je gvidado de E-kursoj, simile al eksterlandaj radiostacioj.

Oni decidis fondi „Centran Bibliotekon" che la Ch. E. kaj uzadi parton da ghi kiel „Migranta Biblioteko" al grupoj en tuta Pollando. La organizadon oni transdonis al la Ch. E.

La Ch. E. fondos „Centran Esperantan Muzeon kaj Arhhivon". Oni devas alvoki chiujn s-anojn al donacado por la „Centra Biblioteko, Muzeo kaj Arhhivo".

La Ch. E. klopodos pri fondo de „Eldona Kooperativo", kies celo estos eldonado de lernolibroj, vortaroj, „perloj" de la pola literaturo ktp: Oni decidis eldoni en plej proksima tempo valorajn propagandilojn pri historio de la demokratio en Pollando.

Unu el la plej gravaj aferoj estas fondo de sekcioj. Ghis nun ekfunkciis laborista, kooperativa kaj instruista sekcioj; en fondo estas skolta (Gdynia) kaj studenta (Łódź). Le regularon por sekcioj preparos la Ch. E.

Oni proponis starigi „Propagandan Fondon" che la Ch. E. (Toczyski).

Sekvontan Tutpolan promesas aranghi Warszawa.

Oni transdonis al la Ch. E. la preparajn laborojn por organizo de 60-jara jubileo de E. kaj ekskurso al Internacia E.-Kongreso en la jaro 1947 en Ghenevo (Garbar).

Proponon pri aligho de AEP al IEL (Dratwer) oni, post longa diskutado, lasis por solvi al la Ch. E. pro ekzistado de multaj aliaj internaciaj E.-organizajoj kaj pro la ebleco de kunfandigho de UEA kaj IEL.

Oni decidis alighi al „Rondo de Amikoj de Organizajho de Unuigitaj Shtatoj".

Oni komisiis al la Ch. E. pli fortan kontakton de AEP kun aliaj sociaj, profesiaj, kultur-klerigaj, sciencaj kaj politikaj asocioj en Pollando (Zawada).

Oni decidis organizi kursojn inter la skoltaro.

Oni decidis elsendon de propagandistoj-esperantistoj eksterlanden, por klarigi la nunan politikan, ekonomian kaj socian staton de Pollando.

Sufiche viglan diskuton elvokis la rilato de polaj E-istoj al la germanaj (Dratwer kaj Woźnicki). Oni decidis interrilati nur kun tiuj E-Asocioj en Germanujo, kiuj publike kondamnos la hitleran politikon kaj registaron (propono de s-ano Woźnicki). Chiuj konsentis, ke la tuta germana popolo respondecas por la hitleraj kruelajhoj.

Oni komisiis al la Ch. E. kolekton de poshtmarkoj por propagandaj celoj (Toczyski).

Oni tushis la aferon de ordigo de la tombo de la Majstro (Dratwer).

Fine oni akceptis la proponon sendi dankesprimojn al la Prezidanto de la Landa Nacia Konsilantaro s-o Bierut, al la Chef-Ministro Osóbka-Morawski, al svedaj samideanoj kaj Sveda E-Asocio kaj salutojn al „Samopomoc Chłopska" okaze de ghia „Popola Festo".

La Kunveno finighis per kantado de nacia kaj esperanta Himnoj.

La Prezidantaro de A. E. P.

## BLANKA TABLOTUKO

Blanka tablotuko. Teleroj. Brilanta manghilaro. Floroj. Multe da floroj. Sed antau chio — delikataj manoj virinaj. Ili estas chie. Estras chion. Pure... Trankvile... Hejmece...

Songho? Revo? Mi ne scias... Sopiro? Eble...

Dume:

mi portas chifonojn, ne uzas la naztukon, laute dekrachas shelojn de la nepurigitaj terpomoj kaj de tempo al tempo serchas pedikojn...

I. Dratwer

Koncentrejo Budzyń. Vintro 1943 j.

## DEMOKRATIZO DE POLLANDO
### (daurigo)

Venis la terura hitleriana okupado. La ,,supraj dekmiloj" estis en la unuaj semajnoj de la milito forkurintaj el la lando ekterlanden, restis la popolo mem, kiu devis travivi la tutan persekutadon. Tiu persekutado cementigis la popolon, faris ghin pli unueca, pli nacie sentanta, pli liberighe kaj socie aspiranta al siaj celoj. Tiu-chi atmosfero naskis la hodiauan laborist-vilaghanan registaron, kiu en la komenco de sia agado jam alpashis al la grandega socia reformo, nome la reformo **agrara.** La tuta sinjora tero estis disdonita al la vilaghanoj. Socia justeco sur tiu kampo ekregis! Kaj la t u t a nacio aprobis tiun chi pashon.

La dua granda pasho al demokratizo de la pola nacio estis la demokratizo de la a r m e o. La tuta spirito de la mezepoka, feudalisma, despotisma, sinjoreca armeo forighis sub la premo de la liberighinta popola, egaleca spirito, kaj ni povas hodiau sincere diri, ke ni havas **popolan** armeon. Miloj da klerigaj kursoj en la armeo helpas al disvastigo de la nova penso. Malmultaj esceptoj konfirmas nur la regulon.

La tria, vere plej chefa socia reformo che ni estas la reformo **lerneja.** Superaj lernejoj malfermis larghe siajn pordojn al la filoj de vilaghanaro kaj laboristaro, ne povinta antaue revi pri superaj studoj. Miloj da mezaj faklernejoj kaj kursoj ekkomencis la instruadon de la junularo, kiu dum 6 jaroj de okupacio ne povis lerni. Aliaj miloj da humanismaj kaj realismaj mezlernejoj certigas al la popolo la tuthomaran kultur-nivelon. Radikala reformo de popol-lernejoj kun 8-jara deviga instruado, akceptata unuanime che la 2 tutpollandaj pedagogiaj Kongresoj profetas la baldauan levigon de la popolo al supera kultur-nivelo. Krom tio centoj da diversaj kursoj por pli agha junularo kaj plenkreskuloj helpas che la disvastigo de klerigo, kulturo, fakedukado kaj arto.

Multopa progresema gazetaro de chiuj tendencoj, de maldekstraj komunismemaj ghis soci-reformemaj katolikaj disvastighas depost 1 kaj duonjaro en la tuta lando.

Kvara pasho al vera socia demokratizo de Pollando estas la Legho pri naciigo de la grandaj fabrikoj, minejoj, bankoj **ktp.**,

akceptita per la provizora Parlamento (la t. n. „Tutlanda Nacia Konsilantaro") la 3-an de Januaro 1946. Ghi antauvidas ankau la transdonadon de la malpli grandaj objektoj en la manojn de la kooperative organizitaj popolamasoj, kio signifas, ke la monopolismaj tendencoj al „tutshtatigo" de la nacia vivo ne estas che ni regantaj. La mezgranda industrio kaj komerco, same la tuta vilaghana agrikulturo restas pure privataj. Ankau tiu Legho estas de la 95% de la nacio plene aprobita. Pro tio Pollando farighas dank' al la du ekonomiaj reformoj — agrara kaj industria — unu el pioniroj de sensanga, paca socia revolucio.

K o o p e r a t i v a movado, kiu jam antau la milito bele evoluighis, faris dum la nova regosistemo grandegan antauenpashon kaj — kvankam dum la okupacio subpremita kaj en duono de la lando de la germanoj ech tute forigita, ghi rekreskis dum la lasta 1½ jaro ne nur al la antaumilita stato, sed superigis ghin je novaj miloj. Ghia plua evoluo havas antau si vastegan horizonton.

Ne povas esti preterpashita la **reformo de socia asekuro** kaj la nova Legho pri la Laboristaj Entreprenaj Konsilantaroj, kiu donas al la laboristoj eblon de kontrolo kaj kungvidado de chiu entrepreno, ne esceptante la shtatajn fabrikojn.

Fine — en niaj kondichoj vere revolucia **reformo de edzeca juro,** kiu finfine egaligis nian landon al la tuta okcidenta kaj orienta Europo — estas la sepa tre serioza antauenpasho al „europeigo" de Pollando. Kun ghi ligighas la plena religia libereco ankau por sektoj, ghis 1939 per la shato ne allasitaj. (ekz. Metodistoj, Nacia katolicka eklezio ktp.).

Sur la politika kampo oni ne povas forgesi pri la demokratizo de la elekta sistemo, konsistanta en la tre frua legho, akceptita jam en la unuaj monatoj post liberigo de orienta parto de Pollando, kiu donas vere al la tuta popolo la eblon de politika regado en la lando pere de:

Komunumaj, Vojevodiaj kaj Tutlanda Nacia Konsilantaro.

Tio signifas, ke ni ne havas che ni diktatorecon kaj ne volas ghin havi. Ni volas esti vere demokrata lando kun plej progresemaj sociaj reformoj, adaptitaj al la ekonomia, historia kaj kultura nivelo de nia popolo.

Chu chio supre dirita signifas, ke ni atingis jam ian idelan staton kaj ne bezonas plibonigojn? Tute ne! Ni havas grandegajn malfacilajhojn che rekonstruo de la ruinigita lando, ni devas klopodi por doni al chiuj restintaj civitanoj kaj la milionoj de repatriighintoj laboron kaj panon. Ni devas batali kun propra nelerteco en la administrado de la lando, komunumo kaj de la apartaj entreprenoj, ni devas batali kun nia atavisma, „sinjoreca" pensmaniero flanke de la posteuloj de feudala regosistemo, kun la anti-

socia sinteno, pensanta nur pri si anstatau pri la bono de la tuto, en kiu ankau chiu persono estos kontenta; ni devas batali kun la plej nova kaj danghera psihhologio de ,,doktrineco", ne vidanta la vivon antau la teoria penso. Sed — chiujn-chi kaj multajn aliajn malhelpojn materialajn kaj psihhologiajn ni estas deciditaj forigi kaj forigos ilin certe per **propraj fortoj,** kushantaj en la spirito de la nacio, per nova sistemo de la nacia edukado, kiun ni devas nun ellabori, unuvorte — ni estas kontentaj, ke ni povas fari chion mem, kaj ke nur de ni dependas, chu tio estos farita au ne.

Nacia unueco de la lando anstatau la antaumilita multnacieco faciligas tiun-chi taskon. Bonaj rilatoj kun Sovieto anstatau la antaumilita antirusismo, ligitaj kun same sincera frateco kun Ameriko, Anglio kaj Francio certigas al ni internacian pacon, kies plej arda konfesanto estas nia tuta nacio. Ni chiuj sopiras al la regado de la Organizo de Unuigitaj Nacioj, che kiu chiu nacio oferas parton de sia t. n. ,,suvereneco" por la bono de la tuta homarana naci-familio. Ni ne bezonas imiti blinde aliajn sistemojn de socia ordo, char niaj plej progresemaj filozofoj kaj sociaj pensuloj donis al ni idelan sistemon, kiu nur atendas sian realizon per la klerigita, libera pola popolo.

Resumante — ni devas diri:

— La preskau centjara batalo de la pola popolamaso por socia liberigho farighis realeco.

— Nia ghis nun ,,aristokrateca" pensmaniero kaj mondrigardo faris lokon al pensmaniero demokratia, vilaghana kaj laborista, civitan-egaleca, kiu ne konas plu la "pli bone naskitajn", ne hontas plu manan laboron, ne malsuprenigas homon de ,,malpura" laboro, ne plu konas sociajn privilegiojn, sed igas chiujn al klerigo, kulturo, arto, nobla pensmaniero, suprenlevigo de la spirito kaj — tre grave — al **komuna** kunlaboro kaj celado al plibonigo de sociaj rilatoj en sia **nova ,propra, libera kaj kun chiuj nacioj fratece kunvivanta**

Popola Pollando.

**Jan Zawada.**

## KONGRESAJ REFLEKTOJ!

El la raportoj evidentighas, ke la Deka — lauvice kaj la Unua — postmilita Kongreso kaj Ghenerala Kunveno de Delegitoj estis decidoplena. Nur la plejparte gravajn decidojn oni lasis al la Chefa Estraro (Ch. E.), por solvo, decido kaj vivenkonduko. ,,Nur..." kion ghi signifas? chu ekskluzive la Ch. E. devas zorgi pri realigo de ili? Ne, kontraue. Kiel ni vidos, la realigo de tiuj chi decidoj dependas ne nur de la vigla la-

boro de la ChE, ne nur de la bona volo de aliaj E-istoj, la efika solvo de ili dependas **nur** de la plej strecha **kunlaboro** de chiuj aktivuloj kaj samideanoj. La nuna tempo, la demokratia medio de nia shtato, plifavorigas nian ideon, donas sufiche realajn profitojn kaj eblecojn de la antauenpushado de nia afero.

Ni trarigardu la decidojn!

„Deviga abono de „Pola Esperantisto" — chiu grupano pagante la monatkotizon de 18 zł. ricevas samtempe gazeton. Kaj chi-tie dependas nur de la plej strecha laboro de chiuj grupoj akiri akurate kaj kiel eble plej multe da monatpagojn, por plifaciligi la laboron de la administracio de Pola Esperantisto. Kaj ghia enhavo? chu ne deziras chiu leganto enhavorichan, interesan kaj agrable legatan monatan revuon? De kin dependas la realigo de la deziroj? — klarege, **nur** de la legantoj mem! Skribu chiu, kiu povas. Se iu ne kuraghas, bv. skizi viajn pensojn, sciigi nin kaj la redakcia komisiono faros laupove de ili taugan artikolon.

Fondo de „Centra Biblioteko", „Esp. Muzeo kaj Arhhivo" (landa), „Propaganda Fondo", „Kolekto de pm. por propagandaj celoj": kaj denove — efektivigo de tiuj decidoj dependas de la kunlaboro, bona volo de chiuj polaj s-anoj. Ni bone scias, kiom multe da esp. havajho perdighis dum la lasta kruela milito. La restajhoj certege nemultaj nur estis dispecigitaj. Kolekti ilin, montri al chiuj, konservi kaj kompletigi — plej serioza devo. Do, mi alvokas chiujn donaci la restajhojn al la ChE, kiu garantias por la plej bona ekuzo de ili por propagandaj celoj. La nomojn de oferontoj ni publikigos en P. E.

„Eldona Kooperativo" — superflua klarigo; chu ekzistas kooperativo el unu ano ekz. ChE? Vi nenion riskas alighante al ghi, kontraue, vi helpos al la propagando de nia afero. Listo de kooperativanoj publikigota.

„Fondo de Sekcioj" — ankoraufoje devo de grupoj varbi anojn por sekcioj kaj tiamaniere plivigligi nian laboron kaj disvastigi la ideon.

Preparajn laborojn por festi 60-jaran Jubileon de Esperanto en 1947 — viajn proponojn, supozojn ktp. sciigu al ChE por ev. ekuzo en preparo de la programo.

Do, karaj samideanoj, ekuzu libertempon por pripensi la menciitajn aferojn, farighu aktivulo, se vi ghis nun tiu ne estis; memoru, ke chiuj, ech plej malgrandaj oferoj, kunmetitaj donos grandan aferon. Ni atendas vian kunlaboron!

**Lo Ko**

## REFERENDUMO EN POLLANDO

Lau decido de la Landa Nacia Konsilantaro (provizora pola parlamento) okazis la 30. VI. 1946 popola vochdonado (referendumo) por ricevi respondon al jenaj 3 demandoj:

1) chu vi estas por forigo de la Senato (dua chambro de la parlamento),

2) chu vi deziras firmigon en la estonta konstitucio de la ekonomia organizo, enkondukita per la agrikultura reformo kaj per la naciigo de chefaj ekonomiaj branchoj restigante jurajn rajtojn de la privata iniciato,

3) chu vi deziras firmigon de la okcidentaj limoj de Pollando je Baltiko, Odro kaj Niso Luzita?

La respondo povas teksti nur „jes" au „ne".

Oficialaj rezultoj de la vochdonado estas jenaj:

| | |
|---|---|
| rajtigitaj al la vochdonado estis . . . . . | 13,160.451 |
| vochdonis . . . . . . . . . . . . . | 11,857.986 |
| el kiuj estis validaj . . . . . . . . . | 11,530.551 |
| je la unua demando respondis per „jes" . . . | 7,844.522 |
| per „ne" . . . | 3,686.029 |
| je la dua demando respondis per „jes" . . . | 8,896.105 |
| per „ne" . . . | 2,634.446 |
| je la tria demando respondis per „jes" . . . | 10,534.697 |
| per „ne" . . . | 995.854 |

Per la rezultoj ricevis la pola registaro flanke de la nacio aprobon de la ghisnuna interna kaj ekstera politiko kiel ankau de la chefaj punktoj por la estonta konstitucio.

## MEMORE AL TIUJ, KIUJ FORIRIS...
### (daurigo)

**Belmont Leo** el Warszawa, akademiano kaj poeto, fama esperantisto, mortis en varsovia „ghetto".

**Róbin Wilhelm** dro el Warszawa, vicprezidanto de T. E. K. A., unu el plej malnovaj esperantistoj, murdita de germanoj en Bińsk.

**Lejzerowicz Izrael** (Georgo Verda) el Łódź, jhurnalisto, autoro, prez. de Lodza Esp. Societo, gazumita de germanoj en Treblinki.

**Dreher Leopold** dro (Leo Turno) el Kraków, Lingva Kom.-ano, autoro de lernolibroj, ghen. sekr. de P. E. D., murdita de germanoj en 1941 en Lwów.

**Blassberg Maksymilian** dro el Kraków, prez. de T. E. K. A., unu el plej malnovaj esperantistoj, pereis en germana koncentrejo.

**Lubliner Stefan** el Warszawa, redaktoro, kas. de jubilea Univ. Kongreso en 1937, pafita de germanoj en Trawniki.

**Oberrotman Adolf** el Warszawa, longjara U. E. A.-delegito, gazumita de germanoj en Treblinki.

**Litauer Józef** adv. el Warszawa, estrarano de „Laboro", murdita de germanoj.

**Essigman Stanisław** dro, estrarano de P. E. A., malnova esperantisto kaj lia edzino

**Essigman Tekla** el Warszawa, ambau murditaj de germanoj.

**Muszkatblat Paulino** dro el Warszawa, estraranino de „Konkordo", gazumita de germanoj en Treblinki.

**Kuriański Filip** el Białystok, estrarano de Bialistoka Esp. Societo, murdita de germanoj en Bialistok.

**Wiesenfeld Edward** el Warszawa, jhurnalisto, estrarano de „Konkordo", pereis en germana koncentrejo.

**Fels Izak** dro kaj lia edzino **Fels Regina,** el Lwów, pafitaj de germanoj en 1941 en Lwów.

**Kukulka Lucjan** pastro el Bydgoszcz, membro de „Scienca Esperanta Rondo", konata kiel predikisto en preghejo de St. Maria dum Univ. Kongreso en Kraków en 1931, arestita kaj ghismorte turmentita en germana koncentrejo.

**(daurigota).**

## CENTRA BIBLIOTEKO ESPERANTA

Dum la hitlera reghimo en Pollando chiuj grupaj kaj privataj bibliotekoj esperantaj estis detruitaj. Nur malgranda kvanto da libroj estis savita kaj tiu chi restajho ne povas sufichi por kontentigi chiujn samideanojn. Akiro de novaj esp. libroj estas nuntempe preskau neeble. Pola samideanaro suferas do grave je manko de legomaterialo.

Por forigi tiun chi mankon Ghenerala Kunveno de A. E. P. lau propono de s-ano J. Toczyski decidis fondi Centran Bibliotekon Esperantan, kies celo estas servi al tuta pola samideanaro. El kolektitaj libroj estos formitaj malgrandaj „migrantaj" bibliotekoj, kiuj estos sendataj de grupo al grupo.

Tial la Chefa Estraro alvokas polajn kaj eksterlandajn samideanojn oferi au pruntedoni chiun superfluan au tralegitan libron por tiu chi celo. Kun la sama peto ni turnas nin al esp. eldonejoj kaj autoroj.

Chiun oferajhon ni kvitancos en „P. E.".

**Chefa Estraro de A. E. P.**

## KORESPONDADO

Carl Johanson, Poshtfako, Aneby, Svedujo deziras korespondi kun polaj gesamideanoj.

Albin Piotrowski, Kraków, Rynek gł. 34, peranto de S. A. T. por Pollando akceptas mendojn por Plena Vortaro, S. A. T.-abono kaj por S. A. T.-eldonajhoj.

## SKOLTOJ ATENTU!

Dum la Ghenerala Kunveno en Łódź oni fondis Skoltan Sekcion, kies estro estas s-ano prof. J. Toczyski, delegito de Skolta Esperantista Ligo por Pollando (adreso: Gdynia, Morska 77).

Chiujn skoltojn ni petas komunikighi skribe kun s-ano Toczyski por pli bona kaj efika organizigho.

## KOOPERATIVA ANGULO

Dum pentekosta kongreso de polaj esperantistoj en Łódź, fondighis el iniciato de kelkaj samideanoj, kooperativa sekcio che Asocio de Esperantistoj en Pollando. Pri bezono de tia sekcio ni ne bezonas paroli. Chiuj scias, ke en novaj tempoj, en tempoj de transformigho de socio el kapitalistekspluatema en socialisman, kooperativismo ludos chefan rolon. El chiuj landoj, kiuj post chi milito, chiam pli sociigas sian vivon mastruman kaj politikan, Pollando iris plej ghustan vojon, vojon de kooperativismo. Nenie alie, kiel ghuste en Pollando kooperativismo ricevis tiel fortan antauenpushon. Ne nur oni devas paroli pri disvolvigho de la kooperativaj ideoj, sed ankau ni devas substreki novajn formojn, kiun ghi akceptas, malmulte konataj eksterlande. Ni menciu nur pri laborkooperativoj, au ekzemple pri disvolvigho de vilaghana kooperativismo, kiu entenas chiujn branchojn de kamparana vivo.

Jen taskoj kiuj staras antau ni: 1) per artikoloj, referajhoj, eduki civitanojn al kooperativismo,

2) eldonadon de kooperativisma literaturo,

3) renovigi eldonadon de „Chielarka Standardo", kiu jam antau milito farighis unika internacia gazeto kooperativa en esperanto,

4) priservi landajn kooperativajn movadojn pri disvolvigho de kooperativismo eksterlande, kaj reciproke disaudigi ekstere pri progreso de kooperativismo en Pollando.

Chiuj, kiuj interesighas pri la ideo turnu sin al: Stefan Rosłoniec, Łódź, Cegielniana 30—17, Pollando.

Eksterlandanoj, kooperativistoj estas ankau petataj interkompenighi kun ni, je supra adreso. S. R.

## DANKON AL SVEDAJ SAMIDEANOJ!

Pola samideanaro esprimas sian koregan dankon al Sveda Esperanto-Asocio kaj al svedaj samideanoj, kiuj rapidis kun helpo al polaj esperantistoj, suferintaj dum la germana okupado en Pollando, sendante vestajhojn. Parton da ili disdonis varsovia Komitato, la reston t. e. 234 pecojn oni starigis al dispono de Asocio de Esperantistoj en Pollando kaj la Chefa Estraro disdonis ilin al 40 personoj en 11 urboj. La senditaj vestajhoj ghojigis multajn el ni, char ili kompletigis, kvankam per uzitaj, la eluzitan dum la milito garderobon.

**Vivu sveda samideanaro!**

**Vivu Esperanto, la ligilo inter la tutmonda homaro!**

**Chefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando.**

## GARANTIA FONDO DE „P. E."

Por garantii seninterrompan aperon de „P. E." enpagis:

| | | | |
|---|---|---|---|
| s-ano | Czechowski B., Varsovio | zł. | 150.— |
| „ | Pastro Pięta P., Łąka | „ | 20.— |
| „ | Lidke J., Łódź | „ | 100.— |
| „ | Piotrowski A., Krakovo | „ | 150.— |
| „ | Alfus J., Krakovo | „ | 100.— |

Krom tio Kooperativo de Bakistoj en Krakovo donis subvencion de zł. 10.000.

**(daurigota).**

## RICEVITAJ GAZETOJ

**Esperantista** Revuo por Esp.-Movado en ChSR., adr. Praha 47 ChSR.
**Laborista Esperantisto,** adr. Amsterdam-West, Postbus 8002.
**La Kosmopolito,** adr. 67 avenue Gambetta, Paris 20, Fracujo.
**S. A. T.-Amikaro,** adr. kiel supre.
**Per Unu Vocho,** adr. Poshtkesto 7356, Johannesburg, Sud-Afriko.
**Sudhungarlanda Stelo,** adr. Durer-nyomda, Guyla, Hungarujo.
**La Juna Vivo,** adr. de red. Limmen NH., Nederlando.

## RESPONDOJ

Chiuj samideanoj, kiuj posedas jam nun au intencas verki artikolojn por. „P. E.", bonvolu ilin sendi al nia redakcio. Ni publikigos ilin, se ili taugos.

Samideanoj-korespondantoj, dezirantaj ricevi respondon de ni, estas petataj aldoni poshtmarkon por respondo. „P. E." estas ankorau finance tre malforta. Ni devas shpari!

Autoroj de artikoloj por ,,P. E." estas petataj sendi ankaŭ polan tradukon de la artikolo por plifaciligi la laboron de la Redakcio.

Ricevintoj de svedaj donacoj estas petataj atesti ricevon (detale) de la ajhoj kaj enpagi sendkostojn je konto P. K. O. IV — 1096 ,,Związek Esperantystów w Polsce".

Atentu! Chiujn pagojn t. e. kotizon por A. E. P., abonpagon por ,,P. E.", pagon por libroj direktu al P. K. O. konto: IV — 1096 Związek Esperantystów w Polsce (Asocio de Esperantistoj en Pollando), Kraków.

* * *

Libroj riceveblaj che Admin. de ,,P. E.":

| | | |
|---|---|---|
| W. Reymont. En fumejo de l'opio | zł | 8.— |
| J. Żuławski. Pax | zł | 15.— |
| Kabe. Internacia Krestomatio | zł | 35.— |
| V. Avsejenko. Fraulino Suzano | zł | 25.— |
| A. Grabowski. Postrikolto | zł | 5.— |
| S. An-ski. Dibuk | zł | 15.— |
| Fouque. Ondino | zł | 35.— |
| Unua kajero | zł | 10.— |

(Por afranko aldonu 10% de la sumo. Livero pro malgranda provizo sendeviga.

---

ABONO: jare zł 100.—, duonjare zł 55.—. Por la jaro 1946 t. e. de majo ghis fino de l'jaro zł 70.—. Aparta numero zł 12.—, eksterlando 2 intern. respondkuponoj.

ANONCOJ: 1/2 pagho zł 1.000.—, 1/4 pagho zł 500.—, 1/8 pagho zł 250.—. Korespondado: 1 vorto zł 2.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 100.—, półrocznie zł 55.—. Za rok 1946 t. j. od maja do końca roku zł 70.—. Numer pojedyńczy zł 12.—, za granicą 2 kupony międzynar.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 1.000.—, 1/4 strony zł 500.—, 1/8 strony zł 250.—. Korespondencja: 1 słowo zł 2.—.

Redaktas: Komitato.
Eldonanto: Asocio de Esperantistoj en Pollando.
Adreso de Redakcio kaj Administracio: Kraków, Rynek Gł. 34, ofic., III p.

---

Presejo „Litodruk" — Kraków, Radziwiłłowska 23 M-14259